

Heinrich Heine,
En admirinde bela
maj'

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj',
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',
dum birdotril' senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im
Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 - †1856-02-17) en Esperan-
ton de HANS-GEORG KAISER (Ce-
zar, *1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro de
la kantoj“, sekcio „Lirika interme-
zo“ (1822 - 1823), n-ro I. La tradu-
ko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo,
kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser
en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,
En la mirinda bela
Maj'

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj',
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',
dum birda tril' ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo "Im
Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 - †1856-02-17) en Esperan-
ton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kal-
mano Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26
12:08:05)*

Heinrich Heine,
En Majo

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo*

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo
"Im Mai" de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 - †1856-02-17)
en Esperanton de MANFREDO
RATISLAVO (Manfred Retzlaff,
Stettiner Str. 16, D-59302 Oel-
de, Germanio, *1938-11-04)
en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403
(2004-04-05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Libro
de la kantoj“, sekcio „Lirika in-
termezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*